

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 299 (66) - KVINA EPOKO

JUNIO 1997



**28a KATALUNA
KAJ 1a
TRANSPIRENEA
KONGRESO DE
ESPERANTO**

**FIGUERES
1-4 MAJO 1997**

Jen la kongresejo kaj la kongreslibra frontpaĝo, ĉi-lastaj laŭ desegno de Roser Segura.



ASSOCIACIO
CATALANA
D'ESPERANTO



KATALUNA
ESPERANTO-
ASOCIO

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785

Kolektiva membro de Literatura Foiro

Peranto de: UEA-FEL, Literatura Foiro, IKEL, La Kancerkliniko.

Apartat/Poŝtkesto 290-08200 SABADELL (Vallès Occidental) Catalunya/Katalunio

Tel + Fakso (93) 716.36.33, (ekde lundo ĝis vendredo inter la 17a kaj 20h.).

Elektronika adreso: kea@stel.net

Web paĝo: <http://www.stel.net/esperanto/kea>

Kotizoj por la jaro 1997: Individua Abonanta Membro 3.350 p-toj; Individua Subtenanta Membro 6.700 p-toj; Individua Dumviva Membro 67.000 p-toj; Kolektiva Membro 6.700 p-toj; Juna Membro 2.500 p-toj.

Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona - agència 461 Sabadell. Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053.

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Josep Franquesa; Viceprezidanto: Lluís Armadans; Ĝenerala Sekretario: Xavier Rodon; Kasisto: Llibert Puig; Komitatoj: Miguel Ángel Altuna, Arnald Massanas, Joan Marimon, Lluís Aragay, Mercè Porta, Paco Belmonte i Felip Artero.

Kontrola Komisiono: Èric Collignon, Bartomeu Costa, Ramon Percra

Kataluna Esperantisto: M.A. Altuna, C. Berga, P. Bernús, Ll. Puig, O. Puig, X. Rodon, Luz Vázquez

La artikoloj publikigitaj en *Kataluna Esperantisto* ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo: Apartat 32.318 - 08080 BARCELONA

Impres a/Presita ĉe: Prest Graf. Sabadell. Tel. (93) 725.50.91

Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

La nuna numero okupiĝas plejparte pri nia Kongreso kaj pri ĝi elstaras la nova rubriko "La kongresanoj opinias". Nur per la opinio de la propraj partoprenantoj ni povas testi ĉu nia programo plaĉis aŭ kion ni devas plibonigi estonte.

Ankaŭ la kongrestemo kaj ties rolantoj, la NRO-j (Neregistaraj Organizaĵoj) vaste reprezentigis en la nuna numero. Ke ilia socia prestiĝo kreskas estas mem evidente kaj kunlabori kun ili estas tre rekomendinde por nia alternativa movado.

De longe KEA komprenis tion, kiel pruvite en nia 27a Kongreso okazinta en Mataró en 1995, nia aliĝo al FOCIR (Federacio de Internaciaj Katalunaj NRO-j) kaj laste nia nuna kongreso.

**NIA ASOCIO DEZIRAS
AL VI ĈIUJ FELIĈAN
SOMERFERION !!!**

ANKAŬ KEA EN INTERRETO

Ni invitas vin viziti nian paĝon WEB. Tie vi trovos plej freŝan novaĵojn. Jen sekve niajn datumojn:

Paĝo Web:

<http://www.stel.net/esperanto/kea>

Elektronika poŝto:

kea@stel.net

FONDAĴOJ

Ni bonvenigas donacojn por niaj fondaĵoj, kaj sekve informas pri ilia nuna situacio:

Fondaĵo Bosnio	ĝis 30.06.97	... 27.500 p-toj
Fondaĵo Komputilo	ĝis 31.03.97	.. 7.500 "
Marti Aguado - Girona	5.000 "

Nia 28-a Kataluna E-Kongreso okazinta en Figueres inter la 1-a kaj la 4-a de majo superis la nordan artefaritan landlimon kaj fariĝis ankaŭ 1-a Transpirenea E-Kongreso kun la kunlaboro de la tieaj proksimaj Federacioj.

Aliĝis entute 131 gekongresanoj, el kiuj ĉirkaŭ 30 aktivuloj el la kunlaborantaj transpireneaj organizaĵoj, tamen la Kongreson vizitis pli ol 200 geesperantistoj. Se vi kara leganto emas la statistikojn, jen tiu pri partopreno laŭ urboj: elstaras unualoke Sabadell kun 32 gekongresanoj, dualoke Barcelono kun 27 kaj trialoke Figueres (la kongresurbo) kun 6. Aliĝis cetere gekongresanoj el Badalona, Blanes, Cervià de les Garrigues, Girona, Lleida, Mallorca, Manlleu, Mataró, Reus, St. Cugat del Vallès, Sta. Coloma de Gramanet, Tarragona, Terrassa, Vic kaj Vilanova i la Geltrú.

La inaŭguro okazis en la loka Urbodomo prezide de la urbestro mem s-ro Joan Armengué, kiu tre afable bonvenigis la gekongresanojn. Nome de la LKK bonvenigis kaj dankis Glòria Queirós la plej juna komitatanino; salutis nome de FEL, Àlex Humet; nome de UEA, Renée Triolle; Jean Hènin kiel prezidanto de la Federacio Langvedoko-Rusiljono; Jorgos nome de la Federacio Mez-Nordaj Pireneoj; Manuel Casanoves kiel unua prezidanto de KEA; Jordi Armadans prezentis la kongrestemon: "La Neregistaraj Organizaĵoj (NRO-j) kaj la internaciaj rilatoj" kaj la prezidanto de KEA Josep Franquesa dankis ĉiujn.

Pri la kongrestemo prelegis Manuel Casanoves pri "La fondiĝaj jaroj de Amnestio Internacia" (prelego, kiun ni reproduktas ĉi-numere); Jordi Armadans pri "Moviments Pacifistes"; Monique Garrigues pri "ACAT-Asocio de Kristanoj kontraŭ la torturo"; Daniel Durand pri "Monda Fonduso de Solidareco kontraŭ la malsato" kaj "Civitanoj de la mondo kaj Kongreso de la Popoloj"; Renée Triolle pri: "UEA kaj kulturaj NRO-j"; Vicenç Viñas membro de Setem pri "El Comerç Just" kaj Daniele Vitali pri "IKEL-Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj".

Eksterteme prelegis Daniele Vitali pri: "Fonetiko de Esperanto: Kia estu la modelo?" (intervjuon al li de nia aktivulino Luz Vazquez ni publikigos venontnumere).

Ankaŭ pluraj menciindaj aranĝoj kompletigis la programon: Omaĝo al nia kataluna pioniro Delfi Dalmau, naskiĝinta en la kongresurbo, kun la interveno de Manuel de Seabra kaj Jordi Solé i Camardons (detalan raporton ni aperigos venontnumere); plursesia navigado tra Interreto, kaj ĉar internacie antaŭanoncita, ni ricevis plurajn salutmesaĝojn, interalie el Alasko. Ni tutkore dankas la salutintojn!; prezento de baza vortaro E-kataluna fare de Jordi Carbonell kaj Hèctor Alòs; elementa kurso de E. gvide de Neus Moly kaj Ramon Perera ekzamenoj de Esperanto por la unua nivelo; Asembleo de KEA (pri kiu ni raportos vaste venontnumere); Literatura Mateno kun Manuel de Seabra, Vimala Devi, Abel Montagut kaj Hèctor Alòs; prezento de informa vidfilmo pri la venontjara UK-urbo Montpellier kun klarigoj fare de membroj de la tiea LKK kaj ceteraj distraj programeroj: Kurso pri tradiciaj dancoj kaj la koncertoj de "Aigarela" kaj "Jomo kaj la Mamutoj".

Skribe salutis la Kongreson "l'Ateneu Llibertari" el Badalona kaj kontentige informis pri ĝi la lokaj televido kaj gazetaro kun elstara tutpaĝa artikolo aperinta en la ĵurnalo El Punt la 1-an de majo, kiu kun la titolo "Figueres, ciutat verda" verkis nia samideano Manuel de Seabra.



LA KONGRESANOJ OPINIAS

Pri la kongreso de Figueres, mi simple diros, ke la programo estis varia, la prelegoj bonnivelaj kaj la etoso amika. Mi bedaŭras, ke ni ne sufiĉe profitis de la eksteraj okazintaĵoj kaj ke ne okazis ĝenerala kunveno inter niaj diversaj asocioj (ja temis pri transpirena kongreso, ĉu ne?).

Jean Hénin -prezidanto de la Federacio Langvedoko-Rusiljono

Jen mia opinio pri la 28-a Kataluna kaj 1-a Transpirena Kongreso en Figueres: mankis mikrofono por bone aŭdi diversajn voĉtonojn de iuj gepartoprenintoj en la prelegoj, eble mia aŭdkapablo lamas. Ankaŭ oni tro longigis iun prelegon kaj tiel oni malpliigis la ĉeestadon de la sekvinta aranĝo. Estonte oni devus insisti pri la programhoraro, ke ĝi estu pli-malpli akurata kaj fine en la urba vizito oni improvizis la tradukiston, tasko hazarde plenumita de s-ro Humet. Tamen, entute, mi valoras sufiĉe bone la kongreson.

Bartomeu Costa el Manlleu

Mi tre ĝojis tiun kongreson, ĉar ĝi estis plurgeneracia (maloftas gepatroj kun junaj infanoj), plurlanda (kio pravigas la uzon de esperanto) kaj simpatia. Mi aprezis la kulturan nivelon de la diversaj aranĝoj, ĉu literatura forumo, ĉu diversaj prezentoj kaj prelegoj, ne parolante pri la muzikaj vesperoj, kiuj kantigis aŭ dancigis la ĉeestantojn. La fakto, ke vi organizis tiun kongreson dum la loka festo ankaŭ kontribuis al la sukceso: ni ne estis izolitaj sur esperanto-insulo, sed meze de vivplena urbo, kie la tradicioj plene vivantas. Mi gratulas kaj dankas la organizantojn, kiuj pruvis sian kapablon.

Renée Triolle- vicprezidanto de UEA

Vi petis de mi raporti pri tiu kongreso eĉ negative, do mi serioze cerbumis pri tio, sed vere ne trovis negativajn aspektojn en via organizado kaj en la ĝenerala disvolviĝo de la kongreso. Ĉu tamen mi povus kritiki la manĝojn, kiuj estis kelkfoje iom strangaj laŭ kvanto kaj kvalito, sen paroli pri la bankedo. Vi ja opinios ke estas tipa franca sinteno nur pensi kaj paroli pri manĝo, sed tamen mi aŭdis samajn kaj eĉ pli akrajn kritikojn far de katalunoj. Sed fakte, tio estas detalo kaj mi ne povos argumenti mian raporton pri tio.

Pri la temo mem de la kongreso, mi konfesas ke mi ne sekvis ĉiun prelegon tre asidue kaj do ne povas juĝi. Mi tamen, eksterteme, tre aprezis la spertan prelegon de Daniele Vitali pri la fonetikaj aspektoj de Esperanto.



La artaj vesperoj, kvankam tre noktaj, por ni francoj, estis tre allogaj, altkvalitaj kaj vivplenaj.

Sed finfine, kio estis la plej forta memoraĵo de tiu kongreso estas la ĝenerala juneco de la kataluna movado, mense kaj fizike. Mi devas konstati ke ĝi estas ekzemplo kaj sekvinda aŭ sekvunda modelo, kompare kun la franca movado, kiu pli kaj pli maljuniĝas. Konstatebla estis, bedaŭrinde, la malgranda partopreno de la francaj transpireneanoj kaj ties pli granda mezaĝo.

Bernard Legeay el Agen d'Aveyron

Gratulon! Plej interese, mi pensas, estis la granda partopreno de malsamlingvanoj. Tio ege malhelpas la krokodiladon, kiu bedaŭrinde oftas ĉe naciaj kongresoj. Pro tio estus bonege ripeti estonte, kongresajn kunaranĝojn kun la transpirenaj samideanoj, kiuj ja riĉigis la etoson.

La organizo de elementa E-kurso por komencantoj dumkongrese estis ege taŭga, ĉar tio povas kuraĝigi la partoprenon de ne esperantistoj por kontakti unuafoje kun la internacia lingvo. Mi proponas ĝin denove aranĝi por venontaj kongresoj.

Mi sugestas se eble ke KEA prizorgu la loĝadon. Tio ebligus esperantan etoson ĉe hoteloj kaj pensionoj kaj eble tio plibonigus la prezojn.

Jen plendeto: Mi havis la eblecon ĉeesti la koncerton de Jomo kaj la Mamutoj, interese ga muzikantisto kaj ni ĉiuj konstatis la, iomete netolereman sintenon de la respondeculoj de la ejo pri modifetoj de la strikta horaro. Eble estus bone klopodi en venontaj kongresoj, havi pli da libero pri la uzo de la kongresejo.

Koncize : sufiĉe sukcesa Kongreso, kiun mi memoros kiel la nacia aranĝo kie mi malpli krokodilis!!

Antoni Badia el Lleida

Aùdinte ke ĉi-jara kataluna kongreso okazos en Figueres, memoro pri genia homo invadis mian menson. Ĝi temas pri la tero de unu el la plej grandaj pentristoj de nia jarcento, nome, Salvador Dalí. Ĉu la urbo entenas ankoraù trezore garditan la inspirofonton de la dorlotanto de Gala ?

La legendo pri la mita tramontano ankaù akompanas la rigardon al la urbo, onidiro pri tiu norda vento kiu trapasinte la apudmediteraneajn Pireneojn frenezigas homojn, svingas la sentojn, incitas al maldecaĵoj...tiu vento mistera al kiu Dalí mem aljuĝis parton de sia geniaco.

Se ni al ĉio-ĉi aldonas la ĉeeston de la plej skandalema E-junularo sur la konata mondo, la perspektivoj pri "frenopatika" fenezetosa Kongreso sovaĝis: Mediteraneo, Surrealismo, ĥaoso, Pireneoj, "Supra Empordano", sardanoj, arto, Lluís Llach, Ludopiko kaj eliksiro sangsoifa...

Sed tramontano blovis tiel forte kiel burjasotanoj kantantaj "La Espero"-n, la spirito de Dalí turismece vagis ĉe la foiramaso, Felip senhonte eùropecas (ĉu ĉi, Filipino, baldaù aliĝos al la sciencologia religio?), Ferriol daùre plurlingvumas kaj krevigas niajn ĉirkaùpireneajn neùronojn jen eùske, jen okcitane, galege, katalun-katalune, valenci-katalune, hispane kaj eĉ esperante.

Feliĉe ni restas ankoraù 22 (aù 26) milionoj kaj ni vastiĝas (Zaragozo tremas). Iamaj plej kuraĝaj kaj ikonoklastaj esperantistoj ne plu skandalas en publika drinkejo per hispanhimna "ĉinda-ĉinda". Resume, ne plu da amo sur la monda surfaco.

Sed la oficiala fako de la fako de la afero nin plene satigis. La prelegejo inspiris la plej postuleman kulturvoranton, ĝi temis pri iama biblioteko belega kie okazis vere interesaj prelegoj.

Mi plej ŝatis tiun de Jordi Armadans pri la nuna situacio de la pacifisma kaj kontraùarmea movado, tiun de Daniele Vitali pri minoritatoj kaj korekta prononco

de Esperanto (kun taùgaj mencioj al Martinhaase-aj "r" realigoj) kaj la literaturan prezenton de Manuel de Seabra kaj Abel Montagut.

Aliflanke la muzika flanko estis varie kaj digne reprezentata de la kabaret-rokecaj Mamutoj (tre bona koncerto kvankam la sonkondiĉoj ne estis tre favoraj) kaj de la okcitanfolkloro Aigarela (ili sukcesis diskonigi tieajn kantojn dancigante nin ĉiujn).

La organizado elstaris, nur kelkaj problemoj kun la interretejo la unuan tagon; oni atingis agrablan etoson kaj ili ne respondecas pri la malviglo nokta en Figueres, sed kion fari ?

Ni sopiris al surrealisma kaj tramontana urbo, sed valute ni ricevis modernisman kaj malfermitan Figueres kiu eĉ sardan-dancis kaj "homkastelumis" por ni kaj montris sian ĉarmon kaj la plej taùgan drinkejon por manĝi "pa amb tomaca" (tomatpanaĵo). Nur mankas al ĝi forigo de la militistoj...

Rafael Blanco el Altsasu

La Kongreso estis iomete multekosta por mi kaj ankaù por kelkaj aliaj. Mi komprenas ke la Kongreso havas multajn kostojn, sed sen ia dubo pri la boneco de la organizantoj, mi kredas ke malgrandigi la kostojn estus tre bona afero. Laù mi, ĝi estas la plej bona solvo por havi multajn kongresanojn en venonta okazo. Ankaù mi akceptas, ke eble tio ne eblas.

Pri la prelegoj mi povas diri ke mi multe ŝatis kelkajn, malgraù tio ke la temo ne estis mia plej ŝatata, sed tiuj prelegantoj kiujn mi aùskultis estis tre kapablaj homoj. Eble estus interese ankaù havi aliajn aranĝojn, ĉar la prelegoj kelkfoje estas tre malaktivaj.

Mi multe ŝatis Jomon kaj la Mamutojn kaj ankaù la okcitanajn dancojn. Malgraù tiuj malgrandaj problemoj mi multe ŝatis la Kongreson .


Isaac Salazar el Mataró



NI KONU NIAJN GASTOJN: LA KONGRESAJN NEREGISTARAJN ORGANIZAĴOJN

CIVITANOJ DE LA MONDO

Ni kunsendas informilon, kiun tre afable disponigis al ni ĝia Esperanto-fako.



MONDA FONDUSO DE SOLIDARECO KONTRAŬ LA MALSATO

Ĉeestanta en 31 landoj, ĝi estas organizaĵo sendependa de ŝtatoj kaj de ties institucioj, sendependa de ĉiaj povoj. Ĝi konsistas el homoj ĉiedevenaj dezirantaj partopreni en la tutmonda solidareco.

Ĝi proklamas la fundamentajn homajn rajtojn kaj interalie la individuan rajton sin nutri. Ĝi proponas la kreadon de Tutmonda Instituto pri Solidareco, kaj al tiu celo sin metas simbole sub la juĝorajton de la Kongreso de la Popoloj, unua demokrata organizaĵo estigita de mondaj transnaciaj balotelektoj.

La interpopola solidareco ne povas konsistigi la ekskluzivecon de iu ajn popolo nek de iu ajn kulturo. Tial ĝi prefereble esprimiĝas en Esperanto, lingvo neutrala kreita por la interpopola komunikado.



SETEM (Servo Tria Mondo)

Ĝi estas NRO kiu ekde 1968 promocias justan komercon surbaze de internacia solidareco. La Justa Komerco estas internacia movado kiu postulas kaj promocias pli justajn ekonomiajn rilatojn inter la Nordo kaj la Sudo kaj rekomendas pli respondecan konsumon al la civitanoj.



IKEL: ESPERANTISTA PREMORGANIZO POR LA RAJTOJ DE LA MINORITATOJ

La Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj fondiĝis en Barcelono en 1978. Nuntempe ĝi havas pli ol cent membrojn el multaj etnoj de dudeko da ŝtatoj tra la kvin kontinentoj. Jen ĝiaj agadprincipoj, laŭ punkto 2 de ĝia statuto:

2.1 La asocio bazas sian agadon sur la principo de suvereneco de ĉiu etno en la kadro de tuthomara solidareco. La konsistigaj elementoj de etno estas la komunaj tradicio kaj kulturo, ofte subtenataj de aparta lingvo.

2.2 La asocio tutmonde

- kolektas informojn pri la historio kaj nuna situacio de la etnoj;

- diskonigas tiajn informojn per ĉiaj adekvataj rimedoj precipe per publicaĵoj, seminarioj, prelegoj kaj manifestacioj;

- intervenas ĉe lokaj, regionaj, ŝtataj kaj internaciaj institucioj kaj aŭtoritatoj por forigi diskriminacion kontraŭ etnoj;

- plēdas por la uzado de la internacia lingvo Esperanto en ĉiuj etnaj rilatoj.

2.3 La asocio kunlaboras kun ĉiuj movadoj, institucioj kaj individuoj sur la kampo de batalado kontraŭ etna diskriminacio, restante tamen sendependa de kiu ajn parti-politika aŭ religia ideologio.

Por plenumi tiujn taskojn IKEL eldonas trifoje jare sian bultenon ETNISMO kaj laŭokazajn cirkulerojn.



LA FONDIĜAJ JAROJ DE AMNESTIO INTERNACIA

Jam en la komenco de mia senpretenda prelegeto, mi bezonas peti vian indulgon pro ĝia eble tro egocentra, persona kaj subjektiva karaktero. Tamen mi ne povis tion eviti, ĉar temas ĝuste pri miaj propraj personaj spertoj, memoroj kaj travivaĵoj dum proksimume tridek jaroj.

Temas pri la fondiĝaj jaroj de la Neregistara Organizaĵo AMNESTIO INTERNACIA -kio estas ja io reala kaj objektiva- kaj tamen ne laŭ la oficialaj raportoj kaj referaĵoj de oficistoj kaj historiistoj, sed ĉio laŭ mia vidpunkto, tiel kiel mi ilin spertis, sentis, travivis kaj daŭre memoras.

Kaj mi pardonpetas ankaŭ pro tio ke, kiel dirite, mi ne tuŝos, almenaŭ ne rekte, la nunon de Amnestio Internacia, pri kio aliaj personoj estas pli kompetentaj, sed limigos min al la unuaj jaroj.

La 19-an de julio 1960 unuafoje en mia vivo mi transpasis la ŝtatan landlimon kaj vojaĝis per trajno ĝis Parizo, de kie la postan tagon mi veturis per trajno kaj ŝipo al Londono. La prezo estis entute 2.000 pesetoj....

Miaj kolegoj la Klaretanaj Misiistoj tuj sendis min al Novicejo apud Bristol (ĉe la okcidenta marbordo de Anglio), kaj poste al porpastra Seminario apud Bournemouth kaj Southampton (ĉe la suda marbordo), kie mi estis profesoro dum du jaroj. Ĉiusabate, post la fino de la lecionoj, mi iris fari mian pastran laboron al du paroĥoj en la urbo Taunton, ĉefurbo de la grafejo Somerset.

Ĉiudimanĉe posttagmeze, fininte miajn semajnfinajn taskojn de konfesioj, mesoj kaj predikoj, mi reiris al la stacidomo de Taunton por denove envagoniĝi kaj hejmen reveni. Ĉar tio okazis sinsekve ĉiudimanĉe je la sama horo, mi baldaŭ parkerigis la kanton de la fervojistoj, kiuj anoncis per la laŭparoliloj: "Next train arriving on platform number seven will be the one twenty-five from Plymouth, calling at Bridgwater, Highbridge, Weston-super-Mare, Bristol Temple Meads, Bath, Chipenham, Swindon and Didcot. Change at Bristol Temple Meads for South Wales..."

Nu, dimanĉon la 28-an de majo 1961, kiam mi kiel kutime atendis la vagonaron en la stacidomo de Taunton, tute hazarde mi elektis, el nombro da dimanĉaj ĵurnaloj kuŝantaj sur tablo apud la kajo, ĝuste la periodaĵon "The Observer Week-End Review". Kaj tuj kaptis mian okulon -kaj poste dum la vojaĝo absorbis mian atenton- tutpaĝa artikolo, kies titolo estis "The Forgotten Prisoners" (La forgesitaj malliberuloj). La artikolon verkis la advokato Peter Benenson. La supra rando de la artikolo estis ilustrita de ses fotografiaĵoj, kiuj montris la vizaĝon de la jenaj

personoj: Constantin Noica, filozofo, enkarcerigita en Rumanio; la evangelia pastoro Ashton Jones, amiko de la negroj, arestita en Usono; Agostino Neto, poeto kaj doktoro en Angolo, kiu estis senprocese enkarcerigita en Portugalio; ĉefepiskopo Beran, el Prago, arestita de la ĉeĥa registaro kaj en nekonata loko; Toni Ambatielos, greka komunisto kaj ano de laborsindikato, prizonulo de la greka reĝimo; kardinalo Mindszenty, primaso de Hungario, unue enkarcerigita kaj poste rifuĝinta en la Usonan Ambasadon en Budapeŝto.

Kaj nun sekvis la artikolo - artikolo, kiu fariĝis epokfaranta, ĉar, kiel mi poste eksciis, ĝi vere estas la fondiĝo de Amnestio Internacia. La 28-an de majo 1961 estas do la fondiĝa dato de Amnestio Internacia. En la enkonduka noto oni legas: "ambaŭflanke de la tiel nomata fera (aŭ ŝtala) kurteno, miloj kaj miloj da viroj kaj virinoj troviĝas senprocese enkarcerigitaj nur tial ke iliaj politikaj aŭ religiaj ideoj ne kongruas kun tiuj de iliaj registaroj. Peter Benenson, londona advokato, havis la ideon lanĉi tutmondan kampanjon "Appeal for Amnesty 1961" (Alvoko por Amnestio 1961) por urĝi la registarojn liberigi tiujn personojn aŭ almenaŭ ilin juĝi per deca proceso"

Kaj jen la unuaj vortoj de s-ro Benenson: "Malfermu vian ĵurnalon kaj ĉiutage vi legos pri ie en la mondo, kie iu estis arestita, torturita aŭ ekzekutita pro tio ke liaj opinioj aŭ religia kredo estas neakcepteblaj por lia registaro. Estas kelkaj milionoj da tiaj personoj enkarcerigitaj, kaj ne nur trans la fera aŭ la bambua kurtenoj, kaj ilia nombro pli kaj pli kreskadas. La leganto de la ĵurnalo spertas naŭzon kaj sentas sin senpova. Tamen, se tiuj sentoj de naŭzo ĉie ajn en la mondo povus unuiĝi en unu komunan agadon, la rezulto povus esti vere efektiva. En 1948, la fondintaj membroj de Unuiĝintaj Nacioj aprobis la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj:

"**Artikolo 18:** Ĉiu havas la rajton je libereco de penso, konscienco kaj religio; tiu ĉi rajto inkluzivas la liberecon ŝanĝi sian religion aŭ kredon, kaj liberecon manifesti, ĉu sola aŭ kune kun aliaj, ĉu publike ĉu private, sian religion aŭ kredon per instruado, praktikado, adorado kaj observado".

"**Artikolo 19:** Ĉiu havas la rajton je libereco de opinio kaj esprimo; ĉi tiu rajto inkluzivas la rajton peti, ricevi kaj havigi informojn kaj ideojn per kiu ajn rimedo senkonsidere pri la landlimoj".

Kaj daŭrigas Benenson: "Nuntempe estas neeble ekscii kiom da landoj permesas al siaj civitanoj la rajton ĝui tiujn fundamentajn liberecojn. Ĉar kio vere gravas ne estas ĉu la rajtoj troviĝas surpapere en la Konstitucio, sed ĉu vere tiujn rajtojn oni povas

efektivigi kaj eĉ leĝe postuli en la praktiko. Ekzemple, neniu alia registaro tiel insiste penas kaj klopodas substreki siajn konstituciajn garantiojn kiel la hispana registaro, kaj tamen ĝi malsukcesas en la praktika aplikado. Oni konstatas kreskantan tendencon, ĉie en la mondo, maski la realajn kialojn de la enkarcerigo de la malkonsentantoj. En Hispanio, universitatajn studentojn, kiuj disdonis foliojn por peti la rajton libere kunveni, oni akuzis pri militribelo. En Hungario, katolikajn pastrojn, kiuj klopodis teni malfermitaj siajn lernejojn kaj infanĥorojn, oni akuzis pri samseksemo. Tiaj pretekstoj pruvas, ke la registaroj ne estas sensentemaj je la premo de internacia opinio. Kaj kiam la tutmonda opinio koncentriĝas en unu punkton, kelkfoje okazas ke la koncerna registaro devas cedi. Ekzemple, la hungara poeto Tibor Dery estis liberigita antaŭnelonge post kiam "Tibor Dery" komitatoj estis starigitaj en diversaj nacioj; kaj profesoro Tierno Galván kaj aliaj hispanaj intelektuloj estis absolvitaj antaŭ du monatoj, post kiam kelkaj elstaraj observantoj el eksterlando vizitis la tribunalon."

....."Por ke la opiniforto estu efektiva, ĝi devas esti larĝe fundamentita, internacia kaj tute sendependa de ĉiuj diferencoj pri religio kaj partioj. Kampanjoj favore al la libereco lanĉitaj de unu lando kontraŭ alia lando ofte kondukas al pliakriĝo de la persekutado. Tial ni lanĉas la "Alvokon por Amnestio 1961". La kampanjo, kiun ni lanĉas hodiaŭ rezultis el la iniciato de areto da juristoj, verkistoj kaj eldonistoj en Londono, kiuj konsentas pri la baza konvinko de tiu eldiraĵo: "Mi abomenas viajn opiniojn, kaj tamen mi pretas morti por defendi vian rajton ilin esprimi".

Kaj poste Benenson klarigas, ke la sistemo diskonigi personajn kazojn pri malliberuloj apartenantaj al malsamaj politikaj blokoj estas tute nova. Ĝi estis adoptita por eviti la riskon de antaŭaj kampanjoj por amnestio, en kiuj ŝajne estis pli forta la zorgo diskonigi kaj propagandi la politikajn ideojn de la prizonuloj ol la humanaj celoj.

"La sukceso de la nuna kampanjo dependos de kiamaniere ni povos forte kaj efike mobilizi la publikan opinion. Ĝi estu malfermita al ĉiuj, vere internacia kaj politike senpartia. Ĉiuj estas invitataj, kiuj pretas kondamni ĉiajn ajn persekutadojn, ie ajn en la mondo, kaj senkonsidere pri kiu estas la respondeculo kaj kiuj estas la persekutataj ideoj. La premo de publika opinio, antaŭ cent jaroj, atingis la emancipiĝon de la sklavoj. Nun estas tempo ke la homo akiru la saman liberecon por sia spirito, kiun tiam akiris por sia korpo."

Ĝis nun mi resumis la fondiĝan artikolon Kompreneble, ĝi forte impresis min, ĉar, interalie, mi ne povis eviti la rememoron pri freŝaj travivaĵoj en mia propra lando. Sed, aliflanke, tre plaĉis al mi tiu universala karaktero kaj senpartieco de la kampanjo,

kiu same protestis kontraŭ la krimoj de la dekstremuloj kaj de la maldekstremuloj, de la kapitalismo kaj de la komunismo.

Tial mia reago estis rapida, kaj mi tuj sendis al la Centra Oficejo de la kampanjo kuraĝigan leteron por montri al ili, ke mi estas preta kunlabori per informado pri la situacio en mia kataluna lando. Post kelkaj tagoj mi ricevis dankleteron flanke de la organizaĵo, kaj tuj venis vico da sinsekvaj leteroj ambaŭflankaj. Sed nur multajn jarojn poste mi eksciis, ke mi estis la unua civitano de la hispana ŝtato kiu aliĝis al Amnestio.

Antaŭ ol daŭrigi, mi volas fari kelkajn precizigojn:

Unue. Kiel vi aŭdis antaŭe, la unua nomo estis "Appeal for Amnesty 1961" (Alvoko por Amnestio 1961). Per tio videblas, ke la fondintoj estis eble iom naivaj kaj kredemaj, ĉar ilia optimismo donis al ili la esperon, ke dum tiu jaro 1961 la internacia premo estos tiel forta, ke ĝi sufiĉos devigi ĉiujn registarojn liberigi siajn "malliberulojn pro konscienco". Poste ili komprenis, ke tio estis neebla, kaj ŝanĝis la nomon: anstataŭ "Alvoko por Amnestio 1961", tutsimple "Alvoko por Amnestio" kaj poste "Amnestio", kaj finfine "Amnestio Internacia" (Amnesty International).

Dua precizigo. Por eviti miskomprenojn pri la celo de Amnestio Internacia (ĉar kelkfoje mi aŭdis, kaj eĉ legis, malfavorajn opiniojn de personoj, kiuj havas la impreson ke AI celas malplenigi la prizonojn kaj ellasi ĉiujn krimulojn, ŝtelistojn, banditojn, murdistojn kaj teroristojn), mi laŭtleĝas la unuajn paragrafojn de la Statuto de AI, kiel ĝi tekstas nuntempe, post kelkaj nuancoj kaj etaj modifoj enkondukitaj de la sinsekvaj internaciaj kongresoj:

"CELO KAJ MANDATO"

La celo de AI estas kontribui al tutmonda observado de la homaj rajtoj priskribitaj en la Universala Deklaracio.

Por atingi tiun celon, kaj agnoskante la devon de ĉiu persono rekoni por la aliaj devojn kaj liberecojn egalajn al la siaj propraj, AI adoptas kiel mandaton:

Disvastigi la konon kaj akcepton de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.....

Kontraŭstari, per ĉiuj adekvataj rimedoj kaj sedepende de politikaj konsideroj: la enkarcerigon, enfermigon, areston aŭ aliajn korpajn limigojn de libereco de kiu ajn persono, pro iliaj politikaj aŭ religiaj aŭ alispecaj konsciencaj konvinkoj, aŭ pro ilia raso, sekso, haŭtkoloro aŭ lingvo, kondiĉe ke tiuj personoj ne praktikis perforton aŭ pledis favore al ĝi. Tiaj personoj estas de nun kaj antaŭen nomataj "malliberuloj pro konscienco". AI klopodos atingi la liberigon de tiaj personoj kaj havigi helpon al ili.

Kontraŭstari mortpunon kaj torturon, aŭ kruelan, nehuman aŭ sendignigan traktadon aŭ punon.

Kaj en ĉi tiu kazo, senkondiĉe, tio estas, sendepende ĉu tiuj personoj perforte agis aŭ pledis favore al perforto”.

Do, notu bone, nur pri mortpuno kaj torturo AI kontraŭstaras senkondiĉe. Pri ĉiuj aliaj kazoj, adoptas nur “malliberulojn pro konscienco”.

Unu el la bazaj metodoj de AI estis starigi grupojn, kiuj adoptas kelkajn malliberulojn pro konscienco el diversaj partoj de la mondo, por ke la grupanoj interesiĝu pri ili, pri iliaj bezonoj kaj problemoj, pri iliaj familioj, ktp., kaj skribu al la koncernaj registaroj. Por garantii la senpartiecon, la elekton de la adoptitoj faras ne la grupo sed la Centra Oficejo.

Alia simila metodo por efektiviĝi tiun premon de la publika opinio estas la publikigo en ĉiu bulteno de kelkaj elektitaj kazoj, same el diversaj partoj de la mondo, kaj inviti la membrojn sendi leterojn al la koncernaj registaroj. Kelkfoje okazas, ke registaro kiu klopodas kaŝi al la publika opinio, ke iu difinita persono estas en malliberejo, subite ricevas lavangon da dek mil leteroj, per kiuj ili mirigite ekscias, ke el ĉiu parto de la mondo oni interesiĝas pri la liberigo de tiu persono; kaj ofte la registaro estas devigita cedi por haltigi la internacian premon.

Pri unu tia kazo ni eksciis jam komence de la jaro 1962 dank'al la cirkulero “Amnesty”. Iu membro de Amnestio en Svislando, okaze de Kristnasko estis sendinta gratulleteron al s-ro Francesc Pizon i Malé (adoptita de AI) kun jena adreso

F. Pizon - Prison unknown - To Minister of Justice - Madrid - Espagne

(= F. Pizon - Nekonata prizono - Al Justicministro Madrid - Hispanio)

Kaj al tiu svizo estis resendita la letero, kaj ĝoje li legis, sur la trastrekita adreso: “ Devuélvase al remitente por estar en libertad el destinatario”. Kaj vere estis tiel. Eble vi memoras, ke tiu Francesc Pizon estis la presisto, kiu presis la foliojn, pro kiuj s-ro Jordi Pujol estis kondamnita.

Ĝuste, dum la dua duono de la jaro 1961 kaj la unua de 1962 mi sendis al la Centra Oficejo multajn informojn kaj dokumentojn pri okazintaĵoj en Katalunio. Interalie, mi sendis al ili la tradukon de la aktoj de la proceso kontraŭ s-ro Pujol, kiun milita tribunalo estis kondamninta al sepjara enkarcerigo ekster la kataluna teritorio. Mi sendis ankaŭ fotografadon de s-ro Pujol kaŝe senditan de barcelona advokato kaj alvenintan al mi pere de brita deputito. Kaj mi sendis al ili ankaŭ la kolektivajn protestojn de la barcelonaj advokatoj kaj aliajn dokumentojn pri

arbitraj areŝtoj kaj torturoj sekve de la fama koncerto de la “Orfeo Català”, la 19-an de majo 1960, en la Palaco de la Kataluna Muziko, ktp., ktp.

El ĉio ĉi, profesia ĵurnalisto s-ro Hugh O'Shaughnessy pretis verki artikolon por la unua numero de la nova trimonata revuo “Amnesty”. Sed okazis ke, malfruvespere de la 20-a de marto 1962, subite telefonis al mi s-ro O'Shaughnessy. Li estis konsternita. El la presejo estis malaperinta la originalo de la artikolo, kaj li petegis, ke mi urĝe sendu al li novan kopion de mia materialo.... Bedaŭrinde, en tiu epoko mi havis nek skribmaŝinon nek fotokopiilon, kaj tial mi estis sendinta al li manskribitan originalon, kiu estis la sola ekzemplero.

Tial, dum la tuta nokto mi laboradis por proksimume reverki -kaj anglalingve!- la perditan materialon fidante al mia memoro, kaj la postan tagon frumatene mi sendis al la ĵurnalisto manskribadon dudekpaĝan. Rezulte de tio mi malsaniĝis.

Kiam finfine aperis la unua numero de la nova revuo, mi konstatis, ke la unua artikolo, kiu estis titolita “Catalan Protest” (Kataluna Protesto), resumis kaj adaptis miajn informojn. Kaj ĝoje mi konstatis ankaŭ, ke ne forfalis iom riska frazo mia, pri kiu mi timetis, ke la redakcio ĝin forstrekus.

La frazo estis:” Katalunio nuntempe fariĝis kolektiva malliberulo pro konscienco”.

Kaj mia ĝojo estis pli granda kiam mi denove rimarkis praktike tiun ekvilibron kaj senpartiecon de AI, ĉar la dua artikolo estis pri la ĉeĥa ĉefepiskopo Beran. La verkinto estis la prestiĝa irlanda juristo kaj eksministro Seán McBride, unu el la fondintoj de AI, kiu estis ĵus reveninta el Prago, kie en la nomo de AI li intervjuis la ĉeĥajn aŭtoritatojn por informiĝi pri la malaperinta ĉefepiskopo.

En tiu epoko mi ne povis eĉ imagi ke, dudek jarojn poste, mi havos la honoron verki antaŭparolon por la katalunlingva eldono de la libro de McBride “L'exigence de la liberté” (L'exigència de la llibertat) kaj bonvenigi lin persone ĉe la barcelona flughaveno, kaj akompani lin al Montserrat, kie li alparolis la abaton kaj la monaĥojn.

Kaj nun mi simple listigos kaj nur supraĵe mencios kelkajn aliajn datojn, kiuj rilatas la agadon de AI, ĉefe en nia lando.

- La 28-an de oktobro 1973, 113 membroj de la Asembleo de Katalunio estis arestitaj dum la dimanĉa meso en la paroĥejo Maria Mitjancera en Barcelono. AI adoptis ilin kiel malliberulojn pro konscienco. Mi sendis al Londono la nomojn de ĉiuj el ili

- La 2-an de marto 1974 estis ekzekutita Salvador Puig Antich. Li ne estis malliberulo pro konscienco; tamen AI, kiu senkondiĉe kontraŭstaras mortpunon, klopodis eviti ĝin.

• La 9-an de oktobro 1974, Seán McBride fariĝis Pac-Nobelpremiito. Li estis, ĝis kelkajn monatojn antaŭe, internacia prezidanto de AI.

• La kataluna semajngazeto "Canigó", en decembro 1974, aperigas artikolon mian pri s-ro McBride kaj AI.

• La 27-an de septembro 1975 okazas la 5 lastaj ekzekutoj en Hispanio. Ankaŭ ĉi-okaze AI estis sensukcese petinta ŝanĝon de la puno por ili. Mi mem estis parolinta kun la patrinoj de kelkaj el ili nur tagojn antaŭe.

• En marto 1976, post la morto de la diktatoro, AI sendas reprezentanton al Madrido kaj Barcelono por esplori la eblecon starigi sekcion hispanan. Li kunvokas kelkajn individuajn membrojn kaj, unuafoje, la 12-an de marto, ni kunvenas kaj interkonatiĝas. Ĝis tiu momento, kaj pro sekurecaj kialoj, neniam ni estis vidintaj unu la alian. Ni tuj konvokas la ĵurnalistojn kaj ceterajn amaskomunikilojn kaj komencas kune labori, unue en la sidejo de CIDOB, poste en la Fondaĵo Bofill.

• La 23-an de septembro 1976, grava evento. En la granda halo de la Eŭropa Konsilantaro en Strasburgo, unuafoje en la historio de AI, la 9-a Internacia Kunveno bonvenigas per tondra aplaŭdado observantojn el Hispanio. La eta delegacio konsistis el kvin personoj, du el Madrido (Silvia Escobar kaj Eduardo Muñoz-Seca) kaj tri el Barcelono (la prestiĝa artkritikistino M. Lluïsa Borràs, la konata arkitekto David Mackay kaj Manuel Casanoves).

• Dum la kvartaga kunveno, mi hazarde konatiĝis kun norvega advokato, s-ro Falkenberg, kiu sidis apud mi dum iu tagmanĝo. Kaj li demandis, ĉu mi iam aŭdis pri iu Narciso Julián, komunisto, kiu estis morkondamnita kaj poste restis dum 25 jaroj enkarcerigita en Almería, kie lin vizitis la norvega advokato kiel reprezentanto de AI... Kia hazardo kaj mirinda koincido! Ĝuste tri tagojn antaŭe mi konatiĝis kun s-ro Narciso Julián, kiu reprezentis sian partion en la kunveno de la tiel nomata kaj subtera Kataluna Komisiono pri Amnestio (dum mi estis en ĝi la reprezentanto de AI).

• La 15-an de julio 1977, post la epokfarantaj ĝeneralaj balotadoj de la 15-a de junio - la unuaj en demokratio-, ni subskribas la petskribon al la registaro, por ke AI estu lauleĝa en Hispanio.

• Granda helpo kaj diskonigo rezultis al ni kiam, la 10-an de oktobro de tiu sama jaro, AI ricevis la Nobel Pac-Premion, ĉar ĉiuj radiostacioj intevjuis nin kaj ĉiuj ĵurnaloj petis informojn pri la movado. Ni ne estis ankoraŭ lauleĝaj, tamen ni fariĝis jam popularaj.

• Finfine, la hispana ministrarkabineto, la 10-

an de februaro 1978, aprobis la hispanan statuton de AI kaj, du monatojn poste, la 10-an de aprilo, la Civila Provincestro de Barcelono enskribis en la Provincan Registron de asocioj la nomatan "Amnistía Internacional de España", kies sidejo, por ke ĝi fariĝu malpli suspektinda, estis en mia propra hejmo.

Kaj, alveninte al tiu momento, ni postlasas la fondiĝajn jarojn de AI kaj la prahistorion de Amnestio en nia lando, ĉar komenciĝas la moderna historio de la movado, kiun mi ne pritraktos.

• La 15-an de julio 1978, oficiale ni kunvenis unuafoje en lauleĝa asembleo por elekti la provizoran estraron de Amnestio en Hispanio, kaj mi estis elektita la unua prezidanto. Sekve, mi mem havis la respondecon kunvoki en Madrido eksterordinaran ĝeneralan Asembleon, kiu okazis la 16-an de decembro samjaran.

Tiam finfine mi povis liberiĝi kaj cedi mian publikan lokon al pli junaj personoj, kiuj konsistigis la novan elektitan estraron, kaj mi retiriĝis al privataj taskoj.

Dume, la movado daŭre kreskadis, kaj nuntempe ĝi havas pli ol 8.000 lokajn grupojn en pli ol 70 landoj, kun entute ĉirkaŭ unu miliono kaj duono da membroj kaj abonantoj en pli ol 150 landoj.

Okaze de la dekjara datreveno de la registara aprobo, en 1988 mi skribis artikoleon, kiu finiĝis jene: "Mi deziras, ke la nova generacio, speciale en nia Katalunio demokratia - tiu iama "kolektiva malliberulo pro konscienco" - tenu ĉiam flamanta la kandelon de Amnestio Internacia, garantio de la defendo de rajtoj kaj liberecoj kontraŭ ĉiuj diktatoroj de kia ajn koloro kaj deveno". Kaj mi havis la ĝojon kaj surprizon aŭdi tiujn samajn vortojn, eldiritajn dum la datrevena solenaĵo en la luksa salonego de la Barcelona Universitato, la 3-an de majo 1988. La prezidantino de AI, la itala s-ino Franca Sciuto, kiu ĝis tiu momento estis parolinta en sufiĉe komprenebla kastilia lingvo, subite daŭrigis dirante: "Kaj nun permesu, ke mi finu per kelkaj vortoj en via lingvo, kiuj estas ankaŭ vortoj de via unua prezidanto Manuel Casanoves. Kaj tiam ŝi legis tiun finan frazon de mia artikolo.

Kaj ankaŭ mi ĉi tie finas mian prelegon. Dankon!

Manuel Casanoves

Figueres, la 1-an de majo 1997

LABORI EN UAB VIVI EN ESPERANTUJO

Tra Eŭropa projekto mi havis eblecon pluperfektigi dum 4 semajnoj en "Universitat Autònoma de Barcelona" (UAB) en Bellaterra. Mi anticipe kontaktis Llibert Puig el Sabadell, kiu tre ĝentile ofertis helpon en la tranoktado. Ni interkonsentis pri kvar familioj, ĉe kiuj mi loĝos po unu semajno. Ĉiuj miaj gastigantoj estis proksimaj al la trajn-linio, do mi povis atingi mian laborejon kutime nur post mirigaj 12-20 minutoj. Kun ĉiuj el miaj gastigantoj ni havis tiom da komunaj temoj! . Montse Casamitjana, kiel instruistino, multe rakontis al mi pri la eduka sistemo, kiu min vere interesis, ĉar mi hejme laboras ankaŭ pri edukado. Ricard Buxó mirigis min per lia hungara lingvoscio, kaj ni multege parolis ekde la satelita televidado ĝis la aventuroj de la domkonstruado. Dani Rubió tradukas multe hejme ankaŭ kiel mi. Do ni povis interŝanĝi informojn ĝis la marketingo de nia scipovo. Kun Montse la kunulino de Dani, ni interkomunikigis per tre speciala formo: ŝi parolis al mi la germanan kaj mi respondis al ŝi angle. Sed malgraŭ tiu komplikeco mi ekkonis tre multe pri ŝia interesa lerneja instru-laboro.

Miaj lastaj gastigantoj estis valona-kataluna internacia familio Èric Collignon kaj Sílvia kaj memkompreneble iliaj du ĉarmaj gefiloj: Júlia kaj Marc. Ĉar mia familio ankaŭ estas internacia (mia edzino finfine ankaŭ estas "mediteranino": ŝi estas rusino, devenanta el la norda marbordo de la Nigra Maro), do ni havis amason da similaj, rakontendaj spertoj. Fine ni ridis, kiam ni komune konstatis, ke dum nia vivo en la malfacilaj tempoj la plej stabila bazo estis nia lingvokono (aldonante iom triste, ke tiukaze bedaŭrinde ne temas pri la internacia lingvo).

Semajnfine mi vizitis Llibert Puig. Lia edzino Carme gastigis min per bonega kataluna fiŝ-specialaĵo. Poste ni vizitis iliajn geamikojn, kies ĉarma filino Iris rapide instruis min kalkuli katalune!

Mi havis ankaŭ riĉan movadan programon. Mi vizitis tri divers-nivelajn E-kursojn de Centro de Esperanto Sabadell (CES), partoprenis amikan vespermanĝon en ĝia sidejo, havis prelegon kun multaj interesiĝantoj en prestiĝa Unesko-Klubo en Barcelono kaj en unu el miaj lastaj tagoj renkontiĝis kun fervojista grupo en Barcelono.

Mi tre dankas al ĉiuj por la certigo de tiu unika ebleco. Sen tio mi nur estus vidinta deekstere la surfacon de la vivo en Katalunio. Nun mi povis iom ekscii, vivante ene de tiom da familioj, parolante multe kun miaj afablaj gastigantoj.

d-ro Péter Broczkó - Hungario

NIA AGADO

DENOVE ESPERANTO EN UĈE

Ankaŭ ĉi-jare kiel kutime dum aŭgusto, okazos E-kurso en la Somera Kataluna Universitato en Prada, gvidata de la paro Neus Moly kaj Ramon Perera.

OMAĜO AL MANUEL DE SEABRA

ACEC (Kolegia Asocio de Verkistoj de Katalunio) sendis al ni esperantlingvan invitleteron per kiu ĝi invitas nin (ĉiujn KEA-membrojn) ĉeesti la omaĝon al nia eminenta samideano, okazonta la 18-an de novembro en la salono de la Asocio de Ĵurnalistoj de Katalunio. Inter la prelegintoj elstaras Herbert Mayer, direktoro de la Internacia Esperanto-Muzeo de Vieno, kiu parolos (kompreneble en Esperanto) pri la rolo de E. en la verkaro de la omaĝato. (Aldonajn informojn ni aperigos venontnumere).

REVUO INTEGRAL

En la maja numero ĉi-jara, paĝo 80-a, aperas informo pri la agado de KEJ kun klarigo pri ties adreso. Ni sincere dankas la redakcion.

FONDIĜAS BIBLIOTEKO-ARKIVO DE KEA

Surbaze de la heredaĵo Petro Nuez kun pli ol 1.000 libroj kaj amaso da revuoj kaj dokumentoj, la Plenumkomitato de KEA decidis starigi sian Bibliotekon-Arkivon kaj bapti ĝin laŭ la nomo de nia neforgesebla samideano "Petro Nuez". Ĝi kolektos ĉefe librojn kaj dokumentojn pri la kataluna E-movado kaj tiucele ni aperigos varbanoncon en la ĉi-jara Jarlibro de UEA. (venonte ni informos pri ĝiaj inaŭguro kaj uzo)

VORTARO ESPERANTO-KATALUNA

Dum la kongreso en Figueres prezentiĝis, kiel menciite en nia raporto, la prova eldono de la baza vortaro Esperanto-kataluna, kiu tuj forvendiĝis.

Temas pri 163-paĝa verko kun 10.000 kapvortoj, el kiuj 5.500 radikoj aŭ ĉefaj vortoj kaj 4.500 derivaĵoj.

Nun oni prilaboras la lastan korektadon kaj oni antaŭvidas disponigi ĝin al la publiko dum septembro, laŭcele uzi ĝin en la venontaj E-kursoj.

IGRE BEZ IGRACKI

Versa kaj proza verko, paralele esperantigita el la kroata, laŭ titolo LUDOJ SEN LUDILOJ.

Aŭtoro : Ana Kusic.

La malnova japandevena fiksfirma kaj triversa poemeto "hajko" tentis niaepoke la intereson kaj ŝaton de okcidentaj poetoj por provi priklari ĝin en siajn respektivajn nacilingvojn; por pli-malpli trafe esprimi sin tiel strikte, sinteze, per nur la, laŭregule, dek-sep silaboj (5-7-5) de la verstrio. La hajko (kiu, fakte, estas memstara parto de tankao) postulas multe pli ol, ŝajne, tiu simpla skema formalisma kaj elementa strukturo, surbaze de la perfekteco japana kapabla kondensi maksimume ideon poezian laŭ entranca animstato.

La kroata poetino Ana Kusic, per sia libro "Igre bez igracki" paralele tradukita al esperanto, prezentas kolekton da hajkoj. La rezulto de la tradukado, laŭ mi (ne strange mi ne kapablas konjekti pri la originaloj) ne estas beletre kontentiga, ĉar foras spontaneco kaj altfluga emocio koncerne la ideojn, eble pro la malfacila laboro traduka kaj la interpunkciado kiu, miaopinie, ne favore helpas por ke oni restu logita de la pli-malpli brilaj sparkoj poeziaj.

La dua parto de la libro konsistas el paragrafoj prozaj kune kun hajkoj. Ili ludas harmonie kaj meritplene. Per aldona ne algluita folio oni indikas pri la pli ol kvardek preseraroj kaj malĝustaĵoj.

Gabriel Mora i Arana

REZOLUCIO DE LA 28-a KATALUNA KAJ 1-A TRANSPIRENEA KONGRESO DE ESPERANTO

Kunvenintaj en Figueres de la 1-a ĝis la 4-a de majo, la gekongresanoj de la 28-a Kataluna kaj 1-a Transpirenea Kongreso de Esperanto,

KONSTATAS

- La kreskantan gravecon de la rolo de la Neregistaraj Organizaĵoj (NRO-J) (pri evoluo, kulturo, defendo de rajtoj homaj, civitanaj, lingvaj, etnaj, pri la medio kaj aliaj) en la globala panoramo de la internaciaj rilatoj, kaj ni komprenas kiel NRO-j, tiuj organizaĵoj kiuj naskiĝintaj pro la socia volo kaj klopodo, luktas por la starigo de vere nova monda ordo kiu respektu kaj garantiu la homajn kaj popolajn rajtojn.

- La malobeon pli kaj pli maltrankviligan de la plej elementaj rajtoj homaj, civitanaj lingvaj, etnaj, kulturaj, primediaj, ktp. nepraj por tutmonda kunvivado digna kaj justa.

KAJ FARIĜAS PERANTOJ de la justaj postuloj de la NRO-j partoprenantaj en la Kongreso:

- Tiuj pri pacaj movadoj kiuj opinias ke oni devas krei la socie justajn kondiĉojn, por ke la paco firme enradikiĝu.

- Tiuj pri evoluo kaj justa komerco kiuj manifestas sian maltrankvilon antaŭ la malekvilibroj inter nordo kaj sudo, kiujn kreis la regantaj ekonomiaj sistemoj.

DENUNCAS

- Ke ankoraŭ nuntempe oni torturas kaj murdas pro kialoj konsciencaj, kulturaj, etnaj, religiaj, laŭ seksa inklino, lingvaj, politikaj, antaŭ la pasiveco kaj foje eĉ kunkulpeco de tiuj landoj el la unua mondo.

- La blindecon de la regantoj kaj de la institucioj kiuj gvidas la ekonomiajn internaciajn rilatojn, kiel la Monda Banko aŭ la Internacia Monfonduso.

- La ambiguan politikon de la membroŝtatoj de la Eŭropa Unio, kiuj laŭdire defendas la lingvajn rajtojn de ĉiuj siaj civitanoj, kio tamen ne konkretiĝas en realaj leĝoj por la defendo kaj promocio de la minoritataj lingvoj.

- APOGAS la alternativojn kaj proponojn kiujn starigas la NRO-j ĉar konstateblas ke tiuj organizaĵoj pli efike kaj fidele ol la ŝtatoj, povas atingi la realigon de tiuj celoj.

- PETAS al la ĝenerala publiko kaj ĉefe al la geesperantistoj, ke ili apogu la NRO-jn kaj aktive partoprenu en ĝiaj agadoj.

- Ankaŭ peras la proponojn de kelkaj NRO-j en la senco ke la adopto de la internacia lingvo Esperanto kiel helpa interrilata rimedo inter ĉiuj homoj kaj popoloj, povas faciligi la demokratecon de la lingvaj internaciaj rilatoj.

Figueres, la 4-an de majo 1997